Manažérstvo životného prostredia ▌2022▌ Management of Environment
Recenzovaný zborník z XXII. medzinárodnej vedeckej konferencie, 5. máj 2022, Bratislava
Proceedings of the 22nd International Conference, Bratislava, May 5, 2022
Slovak Republic
Bratislava: Slovak Society for Environment • Edition ESE-61 • ISBN 978-80-973844-5-6

OPEN ACCESS Article

# DAŬRIGEBLA DISVOLVO DE LA SOCIO KAJ APLIKADO DE LA MEDIOPROTEKTA POLITIKO

**Stano Marček** [1]

### *ANTAŬPAROLO*

[1] Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio | Redaktoro de la revuoj, *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell,* Membro de Akademio de Esperanto
*Email: Stano.marcek@gmail.com*
*Competing interests : The author declare no competing interests.*
*Publisher's Note: Slovak Society for Environment stays neutral with regard to jurisdictional claims in published maps and institutional affiliations.*
*Copyright: © 2021 by the authors.*
*This article is an open access article distributed under the terms and conditions of the Creative Commons Attribution (CC BY) license (https://creativecommons.org/licenses/by/4.0/)*
*This license allows reusers to distribute, remix, adapt, and build upon the material in any medium or format, so long as attribution is given to the creator. The license allows for commercial use.*
*Review text in the conference proceeding: Contributions published in proceedings were reviewed by members of scientific committee of the conference. For text editing and linguistic contribution corresponding authors.*

Medioprotekta politiko fokusiĝas al la zorgema kaj racia uzado de naturaj fontoj kaj kontribuas al subteno de disponoj sur internacia nivelo, celantaj kontraŭbatali regionajn aŭ tutmondajn mediajn problemojn de vivmedio, kiaj estas klimatŝanĝoj kaj perdo de biodiverseco. Ĝi baziĝas sur preventaj rimedoj, riparado ĉe la fontoj kaj la principoj ke "la poluanto pagas".

La protekto de naturaj fontoj (protektataj specioj kaj biotopoj, akvo kaj tero) kaj la ekosistemaj servoj, kiujn tiuj fontoj certigas, estas ĝenerale konsiderataj grava faktoro en la funkciado de sana ekonomio kaj sana socio. Pro la senprecedenca premo al la vivmedio, kiu okazis en la pasintaj jardekoj, inkluzive de grandaj perdoj de biodiverseco, la prioritato fariĝis la disponigo de instigoj kaj garantioj, celantaj malhelpi da mediaj damaĝoj en homaj aktivecoj. Enŝtataj reĝimoj de medioprotektaj respondecoj en EU-membroŝtatoj malsamis laŭ la amplekso de vivmediaj damaĝoj, kiujn ili koncernis kaj de la postuloj por la riparo.

Vivmediaj politikoj de EU estas proponitaj tiel, ke ili akcelu la transiron al daŭrigebla, noviga kaj cirkla ekonomio, en kiu biodiverseco estas protektata, taksata kaj renovigata, kaj sanriskoj, koneksaj al la vivmedio, estas minimumigataj.

Graveco de la vivmediaj kaj sekurecaj problemoj nuntempe daŭre kreskas. Krom la efiko de homaj agadoj al la vivmedio, ni ĉiam pli rimarkas ne nur kvaliton de la vivo, sed ankaŭ la kulturan kaj socian mediojn.

Eŭropa vivmedia politiko baziĝas sur la antaŭzorga principo, preventado kaj eliminado de poluado ĉe la fontoj, same kiel la principo "la poluisto pagas". La kadro por la estonta agado en ĉiuj kampoj de la vivmedia politiko prezentas plurjarajn mediajn agadprogramojn. Ili estas integritaj en horizontalaj strategioj kaj konsiderataj en internaciaj mediaj intertraktadoj. Media politiko venis al la avangardo de la EU-politikfarado, kiam Eŭropa Komisiono enkondukis Eŭropan Verdan Interkonsenton, kiel la ĉefan ŝoforon de sia ekonomia kreskostrategio.

La problemaro de daŭripova evoluo estas parto de la internacia politiko dum pluraj jardekoj. Atingo de daŭripovo estas grava celo de la internacia komunumo ekde 1992, kiam Konferenco de UN pri Medio kaj Evoluo okazis en Rio-de-Ĵanejro. Malgraŭ klopodoj de pluraj internaciaj organizaĵoj kaj registaroj de multaj landoj, la efektivigo de la daŭrigebla disvolva strategio estas ankoraŭ nesufiĉa. Por subteni la ideojn de daŭripova evoluo estis ellaborita nova disvolva tagordo Transformo de Nia Mondo: Tagordo 2030 por Daŭripova Evoluo, konsistanta el 17 daŭripovaj celoj. La membroŝtatoj de UN ĝin akceptis dum la pintkunveno de la organizo en septembro 2015 en Novjorko.

Al la malfavora stato de la vivmedio aldoniĝis la tutmonda energia, nutraĵa kaj financa krizoj kaj avertoj de sciencistoj kaj esploristoj pri la limigitaj naturaj fontoj kaj la klimataj ŝanĝoj. Ĉi tio ankaŭ estas la kialo, kial granda nombro da iniciatoj aperis en la lastaj jaroj por trovi novajn manierojn, metodojn, modelojn, instigojn kaj ilojn por atingi la strategiajn celojn de la daŭripova evoluo.

Slovakio havas, danke al la aprobita nova medidefenda politiko Pli Verda Slovakio - Strategio de Vivmedia Politiko de Slovakio ĝis 2030 (Envirostratégia 2030), establitan proceduron kiel alfronti la plej grandajn vivmediajn defiojn kaj solvi la plej gravajn vivmediajn problemojn.

Vivmedia Strategio prezentas la bazan strategian dokumenton por la vivmedio kun longperspektivaj celoj, celitaj al transiro al verda, malaltkarbona kaj inkluziva ekonomio. Vivmedia Strategio 2030 difinas vizion ĝis 2030 (atingi pli bonan kvaliton de la vivmedio kaj daŭrigebla cirkla ekonomio, uzanta kiel eble plej malmultajn nerenovigeblajn naturresursojn kaj danĝerajn substancojn), identigas bazajn sistemajn problemojn, fiksas celojn por 2030, proponas kadrajn disponojn por plibonigi la nunan situacion.

La principo de provizora singardo estas ilo ĉe riska administrado, kiu povas esti aplikata kiam ekzistas scienca necerteco pri la perceptita risko al la homa sano aŭ al la vivmedio kiel rezulto de certaj agoj aŭ politikoj.

Ekzemple, en kazo de duboj pri la eblaj negativaj efikoj de la produkto, kaj se necerteco daŭras eĉ post objektiva scienca pritakso, instrukcioj povas esti eldonitaj, por ĉesigi la distribuadon de la produkto, aŭ por retiri ĝin de la merkato. Tiaj disponoj devas esti nediskriminaciaj kaj proporciaj kaj devas esti repritaksitaj tuj post kiam pliaj sciencaj informoj iĝis disponeblaj.

Levado de la publika konscio pri la problemaro de defendado de vivmedio kondukas la publikon ne nur al pli granda kompreno de la vivmedi-defenda kunteksto de la ekonomia kaj socia vivo de la socio, sed ankaŭ al plikvalitigo de la prikonsuma decidofarado, la jura konscio de la civitanoj kaj, sekve, la mediprotektado kaj kvalito de la vivo.

Lastatempe sur la kampo de la vivmediaj politik-klopodoj okazis signifa vastigo de la aplikado en spektro de libervolaj aliroj sur la tereno de defendado de la vivmedio. Montriĝas tendencoj pliigi la diversecon de instrumentoj, bazitaj plejparte sur la volontulaj agadoj de la produktantoj kaj la kreskanta konscio de ĉiuj partoprenantoj sur la kampo de la vivmedia protektado kaj kreado. Pluraj proceduroj estas iom post iom normigataj. Samtempe kun ilia praktika ekspansio komenciĝis ilia esplorado, fokusiĝanta ne nur al la studo de teoriaj aspektoj, sed ankaŭ al ĝeneraligo de praktikaj spertoj, akiritaj el individuaj studoj.

Konforme al ĉi tiu aliro, iom post iom aplikiĝas klopodoj transiri de solvado de vivmediaj problemoj post ilia apero al solvoj de teknikaj preventaj kaj daŭrigeblaj, tra la teknologio kaj produkta vivociklo. La konduto de produktantoj kaj konsumantoj iom post iom ŝanĝiĝas kaj la principoj de preventado, de libervoleco kaj la publika partopreno en solvado de problemoj pri vivmedi-protekto estas pli kaj pli aplikataj.

La vivmedia manaĝerado prezentas aron da libervolaj instrumentoj de vivmedi-defenda politiko, kiuj ebligas efektivigon de sistema aliro por solvi problemojn sur la kampo de vivmedia prizorgo kaj la kontinua plibonigo de la konduto de organizoj. Sur la kampo de industria produktado kaj servoj tio estas unu el la plej efikaj iloj por atingi la prioritatan celon – minimumigon de negativaj efikoj de produktadaj agadoj sur individuajn komponantojn de la vivmedio.

La aplikado de libervolaj medipolitikaj instrumentoj ludas gravan rolon, precipe mediajn administradsistemojn, median produktetikedadon, verdan publikan aĉetadon kaj mediteknologian konfirmon.

Aplikante median respondecon, organizoj profitas el reduktado de la negativaj mediaj efikoj,

Bratislava: Slovak Society for Environment • Edition ESE-61 • ISBN 978-80-973844-5-6

rezultiĝantaj el iliaj agadoj. Ekologie sana konduto estas konsiderata komerca avantaĝo, dum malbona media efikeco iĝas malavantaĝo.

La celo de la internacia scienca konferenco "Manaĝerado de la Vivmedio 2021" estis disponigi taŭgan platformon por informi la profesian kaj sciencan publikojn, reprezentantojn de loka registaro kaj ŝtata administrado, interŝanĝon de spertoj kaj prezenton de novaj rezultoj sur la kampo de manaĝerado de la vivmedio.

## Učebnica *Esperanto priamou metódou* v 45-ich jazykoch


**Bohato ilustrovaná učebnica esperanta pre začiatočníkov od Stana Marčeka je vhodná pre kurzy aj samoukov. Ilustrovala Linda Kuruc-Marček. Vyšla už v 45 jazykoch:** anglicky, arabsky, arménsky, bulharsky, česky, čínsky, dánsky, fínsky, francúzsky, nemecky, grécky, hindsky, španielsky, maďarsky, indonézsky, medzinárodný, írsky, islandský, taliansky, japonsky, kórejsky, chorvátsky, kurdsky, latinsky, lotyšsky, litovsky, luxembursky, holandsky, nórsky, perzsky, poľsky, portugalsky, portugalsky (brazílsky), rumunsky, rusky, srbsky, slovensky, slovinsky, švédsky, tadžicky, thajsky, taiwansky, turecky, ukrajinsky a vietnamsky.

**Učebnicu Esperanto priamou metódou sprevádza metodický materiál:**



**500 didaktických obrázkov pre vyučovanie priamou metódou** (pre učiteľov – kartónové fólie A5 vo dvoch kufríkoch, ktoré krok po kroku predstavujú obsah učebnice – **aj na CD**); **CD Správna výslovnosť** v mp3 + **učebnica** v rôznych jazykoch v pdf (čítané esperantské texty + celá učebnica v pdf, viditeľná na počítači); **Pexeso esperanto** (12 dielov s obrázkami z učebnice) a **„apka"** (aplikácia) s učebnicou pre telefóny na: *www.iei.nl/apo.htm*). **Viac informácií pozri:** *martinus.sk/knihy/vydavatelstvo/Stano-Marcek/*; resp. *stano.marcek@gmail.com*.





**Poslucháreň** Stana Marčeka – volne stiahnuteľné audioknihy a piesne v Nemeckej esperantskej knižnici v Aalene: *t1p.de/auskultejo1*

## „Esperanto per rekta metodo" en 45 lingvoj


**Riĉe ilustrita lernolibro de Esperanto de Stano Marček, taŭga por kursoj kaj memlernantoj.**

**La lernolibro jam aperis en 45 lingvoj:** la angla, araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hinda, hispana, hungara, indonezia, internacia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, portugala (brazila), rumana, rusa, serba, slovaka, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama.

**La lernolibron akompanas didaktika materialo:** Instruaj bildoj por rektmetoda instruado (por instruistoj, 500 kartoj A5 en du kofretoj, kiuj paŝo-post-paŝo sekvas la lernolibron – **ankaŭ sur KD** – por projekcii la bildojn); **KD Modela elparolo** en mp3 (voĉlegitaj Esperantaj tektoj + **la lernolibro** en diversaj lingvoj en pdf); **Pekseso Esperanto** (kartludo, 12 volumoj kun 288 bildoj el la lernolibro), **Aŭdo-vida konversacia kurso de Esperanto, Fabeloj de Andersen kaj Grimm; 107 krucenigmoj en Esperanto; „Apo" (aplikaĵo)** por telefonoj: *http://www.iei.nl/apo/* **Pli da informoj ĉe:** *http://katalogo.uea.org/* – aŭtora nomo „Stano Marček" (137 titoloj).







**Esperanto-aŭskultejo** de Stano Marček – libere elŝuteblaj sonlibroj kaj kantoj en Germana Esperanto-Biblioteko Aalen: *t1p.de/auskultejo1*